

Thomas Moore,  
La lasta rozo de somero

*tradukita de N. N. 101*

Nun floras de l'somero la sola lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozo:  
ne estas flor' parenca, aŭ rozburgono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti.  
En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren ĝentile mi disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaĵ ne plu estus,  
En la dezerta mondo volonte kiu restus?

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

Jen la lasta rozeto de fora somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!  
Ne restas parenco, ne unu rozflor'  
Partoprenas kompate en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.  
Nun viajn petalojn disĵetas mi for  
Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte formortus mi mem,  
Se ne plu min atendus amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'  
Volus loĝi izola sen amo-respond'?

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burgono en proksimo,  
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:  
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardeno!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sentemaj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

...

*Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

*Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.*

*Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell\\_C.\\_,\\_Bordigheza](http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C._,_Bordigheza).*

*Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.*